MAJO / JUNIO 1985

60 (78) ISSN 0150-5823

# Laŭte!

**Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista**

Unu numero : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 25 FF

Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M Bordeaux profite al la eldonanto :

Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

*************************************************************

***Valo :***

## DANKON, SINJOROJ ĴURNALISTOJ !

*En "SAT-Amikaro" de marto 85 estas menciitaj multaj kontraŭesperantaj artikoloj aperintaj en franclingvaj gazetoj, kun la koncernaj rebatoj. Tiuj rebatoj estas necesaj kaj efikaj, kaj laŭdindaj iliaj aŭtoroj. Sed ni devas ankaŭ danki la aŭtorojn de la rebatitaj stultaĵoj : ĉar celante misfamigi nian aferon, ili nomas ĝin, kaj tiel konfirmas ĝian ekziston. Eĉ kiam ili pretendas, ke esperanto estas mortinta, per tio mem ili pruvas, ke ĝi estas vivanta. Al tiu ĉi aserto oni povas obĵeti, ke iafoje ili same diras pri volapuko, kiu efektive forpasis, aŭ kunmetas en ian mikspoton esperanton kun efemeraj aŭ mortnaskitaj projektoj. Per tiaj konfuzoj ili evidentigas sian grandiozan nescion pri la internacilingva demando. Estas necese tion ĉi akcenti per trafaj rebatoj.*

*Ja rebatoj estas necesaj, eĉ se ni ne ĉiam sukcesas ilin publikigi, ĉar tiam almenaŭ unu ĵurnalisto ilin legis. Necesaj, sed ne sufiĉaj. En milito defensivo estas ofte malpli efika ol ofensivo. Ni devas ataki la malamikon, kiu sin kaŝas inter kontraŭuloj, sed ankaŭ kaj pli multope en indiferenta kaj nescianta publiko.*

*Por tiu ofensivo ne mankas al ni armiloj kaj municioj. Por nia interna uzo ni disponas bonan gazetaron, kiu liveras al ni utilajn informojn. Tiuj informoj estas materialo, kiun ni uzu per ĝia disvastigado. Esperanto vivas inter ni, ni praktike uzas ĝin, sed tio ne sufiĉas, ĉar ni estas tro malmultaj. Interna plimultigado de la praktikantoj, plivastigado de la afero, unuvorte : propagando.*

*Sendube, la redakcioj de nacilingvaj gazetoj ofte pli volonte akceptas kontraŭesperantajn stultaĵojn ol niajn seriozajn informojn. Ni tamen senlace proponu al ili tiajn informojn. Persista frapado penetrigas najlon. Simpla anonceto pri kunveno de loka grupo, povas esti efika. Tiaj rimedetoj ne estas neglektindaj.*

**********************************************************




La "broŝurulo" ne bremsis sufiĉe ! Plu lavangas eldonaĵoj ĉe SAT-BS ! Jen denove disponebla **"Esperanto en 24 páginas"**, la varbilo por hispanlingvanoj. Mendkodo : EH, Prezo : 3 FF. Rabato por 15 ekz-roj : 40 FF kun inkluzivita afranko. Por 30 ekz-roj : 70 FF.

Jam de multaj jaroj estis elĉerpita la fama verko **"La Mondo ne havas Atendejon"** de Maurits Dekker, en traduko de Faulhaber, kiun eldonis la nederlanda lab. E-asocio FLE en 1951. Ĝi ĵus reaperis, fote represita de la broŝurservo. Temas pri 3-akta teatraĵo, kiu alarmas pri la atombomba danĝero. Majstre tradukita, pri temo, kies gravecon E-istoj neniam subtaksis, tiu broŝuro devis esti ree disponebla, ĉu ne ? (Mendkodo : LM, prezo : 15 FF).

Komenciĝis la tajpado de la tria volumo de **"Verkoj de Lanti"**, anoncita en L! 59, kiam alvenis dika manuskripto kun ne tre facila sed interesega temo : **"La nova paradigmo en psikologio"**. Aŭtoro : Ruben Feldman Gonzalez, iama LJP-peranto en Argentinio, ĉu vi memoras ? Sed lia ĉefa merito tiam estis la e-igo de tekstoj de Krishnamurti. Espereble la volumo estos preta antaŭ decembro kaj inde kompletigos la ĉi-jaran kolekton de la broŝura serio. Restas tempo por aboni ĝin kaj tiel rekte kontribui al plua aperigo de ĉiutemaj E-valoraĵoj. (Monprovizi per 100 FF al nia pĉk. por ricevi la novaĵojn kun 20%-rabato ĝis elĉerpiĝo de la provizo. Amen).

**Kribo**

# VIRINOJ *kaj* ARMEOJ

**Enkonduko de SUZANNE :**


En la SAT-Kongreso, 1984, post debato pri la gvidrezolucio, la plimulto el la kongresanoj petis la forigon de paragrafo, kiu temis pri la soldatiĝo de virinoj. Tion mi bedaŭras. Tia soldatiĝo estas grava fakto ! De nun, pli kaj pli la armeo enŝoviĝos en la socion kaj plifortigos sian potencon. La civitanoj iom post iom konvinkiĝos, ke la armeo estas nepre necesa kaj, konsekvence, neevitebla la milito (same kiel opinias nun multaj viroj, plejparte, verŝajne, filistroj). En la lernejoj, de nun oni encerbigas tion al la infanoj. La virinoj, kiuj soldatiĝis, same "nutros" ilin per tiu konvinko.

Dum la debato, iu kamarado, nefranca, plurfoje asertis, ke kontraŭstari la soldatiĝon de virinoj signifas, ke oni konsentas la viran, kaj ni kontraŭstaru ĉian armeon. Laŭ mi, tiu kamarado miskomprenis la temon. Kontraŭstari virinan soldatiĝon estas plia klopodo kontraŭ armeo. Plie, ĉu ne estas monstraĵo, konsenti, ke estulo, kiu naskas idojn, mortigu homojn, aŭ helpu la "buĉistojn" ?

Mi opinias, ke nur francoj povas konscii pri la graveco de tiu altrudo, pro siaj historiaj pasintaĵoj.

Demokratece oni voĉdonis tiun forigon. Jes ja, ni, liberamantoj, nenion trudu al niaj gekamaradoj. Tamen, ĉu, en iaj cirkonstancoj, tio ne estus dezirinda, kiam temas pri afero, kies celo estas bona por la homaro, kiu nenian profiton havigos al sia defendanto, krom, foje, malagrablaĵoj ? Do, ni provu komprenigi al ili la danĝeron de tia soldatiĝo.

Demokrate voĉdoni ŝajnas la plej justa rimedo ; sed, kondiĉe, ke ĉiuj voĉdonantoj funde konu la prezentitan problemon kaj neniel estu influataj. Sen tiuj ĉi-supraj kondiĉoj aĉan rezulton oni havos. Tion ni konstatas dum baloto aŭ referendumo. Jen kialo de la brems-



ado sur la vojo al pliboniĝo de l' Homaro.

Oni povas sin demandi, kial viroj konsentas pri tia soldatiĝo... Ĉu ili konsideris/as la trudatan militservon kiel aĉan vivperiodon, kaj ili grumblas, bedaŭras esti la solaj, kiuj ĝin suferas, - aŭ ili konservas bonan memoron pri tiu periodo, kaj opinias tute ne grava la virinan soldatiĝon ?

Mi memoras iaman najbaron rakontintan gajigajn anekdotojn okazintajn dum li plenumis la oficon de kvazaŭa servisto ĉe edzino de oficiro, t.e. en propra hejmo de la oficiro. Tion plenumante, li sin trovis pli bone ol en sia hejmo : li estis terkulturisto en montara vilaĝeto, malproksime de urbeto. Alia najbaro, kampardevena, kiu pasigis la militon (14/18) en hospitalo, trovis sin en pli bonaj vivkondiĉoj tie, ol en sia familia vilaĝeto. Mia patro aĉe travivis la militservon en Saharo, kaj la militon en frontaj tranĉeoj ; plie, li estis ano de movebla taĉmento, do ĉiam en danĝerega batalkampo. Li, antaŭ la milito, jam estis kontraŭ la armeo, do neniam li rakontis gajigajn anekdotojn. Tute male !!!

Ni scias, ke la infana menso estas ege impresebla. (Tiuj, kiuj volas regi la homojn, tion scias !). Do, la rolo de la virinoj estas tre grava en la edukado de la idaro. Patrinoj, kiuj konscias pri la "ŝtataj buĉadoj", atente elektu la librojn por siaj idoj - ĉefe temas pri la distraj rakontoj por infanoj - kaj nepre ne aĉetu amuzilojn similantajn armilojn, per kiuj, ludante, image ili mortigas iun. Tiaj ludiloj kutimigas la infanojn al la facileco mortigi iun en ia cirkonstanco. Tio same koncernas la ĉasistojn.

Ĉu la virinoj, kiuj memvole eniras en la armeon, tion faras por esti egalaj al viroj ? Mi supozas, ke la plimulto estas kontenta havi oficon, same kiel multaj junuloj el mia urbeto, antaŭ la ĝenerala maldungeco : ofte, ĉar ili ne ŝatus labori en fabriko. Tamen, iuj ŝatas la armeajn okazantaĵojn, same kiel tiu junulino intervjuita dum radiofonia elsendo.

En pacmovado la virino reliefigu ĉefe la hororon de la buĉado. Kaj ŝi minacu naskostriki : radikala argumento ! Sed ĉu ĝi ĝenos la regantojn ? Pli ol antaŭe la virino estas konsiderata kiel naskfabriko, al kiu oni trudos artefaritan fekundigon. Ĉiama malbonŝanca estulo...

***Jean-Claude :***

*El mia etvasta kulturo mi tiras tiun konstaton : en la homhistorio, en la mitologioj, apud la virbatalintoj ĉiam ni vidas virinojn, pli-malpli. Kaj ne malofte ili ludas la ĉefan rolon.*

*Ĉu pro devigo, trudita de la viroj ? Povas esti, sed ne tute. Probable rolis ankaŭ la persona temperamento. Ĉar en ĉiu el ni - inkluzive de la virinoj - vivas perfortemo kaj batalemo.*

*La seksoj certe - do la korp- kaj mensfunkciado - sed ankaŭ la vivnecesoj kaj la infanoj devigis al roldivido. Kaj tute nature virino estis rigardata kvazaŭ pachaveno, belsimbolo, du kernaj hombezonoj. Bedaŭrinde, malgraŭ - aŭ pro - tio daŭris kaj plu daŭras la militoj. Do ne mirige, ke virinoj decidas partopreni, des pli ke ne malofte la pluvivo de tuta popolo estis minacata.*

*Tamen ŝajnas al mi iom monstre, ke al militservo ili estu devigataj per leĝo.*

*Do leviĝas la ĉiama demando. Kiel eviti militon kaj sekve finvenigi al ebla malapero de armeoj ? Hodiaŭ klare aperas, ke la paco dependos de pli da ekonomia kaj socia justeco kaj ĝenerale de "nova pensmaniero", kiel - inter aliaj - jam diris Einstein. Sed kion fari ? Ne mankas la taskoj, laŭ ĉies temperamento kaj kapabloj. Ĉar tiucele ĉio utilas, eĉ la ŝajne plej modestaj, sengloraj faroj !*

**Ĵanseb :** Perpleksiga temo !

Mi iam diskutis kun fraŭlino, kiu studis por esti militistino. Ŝi ne ŝajnis al mi speciale atakema. Ŝi diris al mi, ke oni prezentis al ŝi interesan laboron (eble administracian ?), ke ŝi havos okazojn por vojaĝi, ke ŝi renkontos multajn kamaradojn. Ŝajnis al mi strange. Mi demandis al ŝi, ĉu ŝi ne timis iri al milito, ekzemple al Ĉado aŭ en Libanon. Ŝi respondis, ke ŝi povos elekti kien ŝi iros... Pri gustoj kaj koloroj...

Mi ne scias, ĉu dezirindas malpermesi virinan militservon. Mi opinias, ke, se viroj devas dediĉi unu jaron (aŭ pli) al la ŝtato, kaj rajtus fari - ne pli longan - civilan servon anstataŭe - estus logike, ke virinoj, kiuj petas la samajn rajtojn - dediĉu ankaŭ unu jaron por helpi aĝulojn, patrinojn aŭ malsanulojn, aŭ por fari pli "virajn" taskojn...

***Nicole D. :***

*Mi iam aŭdis tiun frazon : "La virinoj, kiuj volas egali la virojn, ne havas ambicion !". Mi konsentas pri tiu spritaĵo, kiam temas pri rajtoj, devoj aŭ devigoj kontesteblaj... kiel, ekzemple, militservo.*

*Feliĉe, laŭ mi, nur libervole la virinoj militservas, sed, bedaŭrinde, ne la viroj. Justeco estus, ke ĉiuj havu eblecon elekti, ke ĉiuj ĉiam havu efektive rajton militrifuzi.*

*Sed virinoj ne estas "aparta specio". Skeme, inter homoj*

*(inaj aŭ viraj) estas militemuloj, perfortuloj, sektemuloj... kaj pacemuloj, neperfortuloj, toleremuloj... Kaj en ĉiu homo, pli-malpli vivas tiuj du tendencoj, kiuj laŭ la vivaj cirkonstancoj sin disvolvas aŭ ne, kiujn oni pli-malpli regas aŭ forigas el ni.*

*Ankaŭ pro personaj problemoj, pro ekonomiaj malfacilaĵoj, viroj kaj virinoj povas enkaptiĝi en la alaŭda spegulo ! Milit-servo = vojaĝoj, valoriga laboro, bona materia situacio...*

*Mi konsentas kun Ĵanseb : Kial malpermesi virinan milit-servon al tiuj, kiuj tion deziras ? Trudi al ili la neeblecon ne estas bona rimedo por ŝanĝi la mensojn rilate al la celo, la rolo de armeoj ; kontraŭe, travivante militservon ili finfine havas ŝancon kompreni kiom vana estas la "gloro", kaj ne"senpeka" la kialo...*

*Jes, Suzanne, edukado laŭ ĝenerala senco, ne nur lerneja, gravas por ke iĝu pacema la homaro. Sed atentu, ne estas per trudado de ideoj, eĉ pacistaj, ke oni sukcesos ; estus tro facile. Totalismo estas ĉiam danĝera. Vidu kio okazas sur nia terglobo nome de la paco, de la libereco...*

*Negativismo, senespero, malamo, solvos nenion.*

*Kiel Jean-Claude mi opinias, ke evoluo ĝis paca, neperforta mondo komenciĝas je la plej modesta nivelo, la individua, per edukado celanta memstarecon, klarvidon, socian kaj ekonomian solidarecon, amon al la vivo, ... sendepende de la sekso, de la raso, de la nacio, ĝis starigo de pli justa mondo.*

*Virina militservo estas unu el la multaj simptomoj de mal-sano kaj frenezo de la civilizacio ; necesas almenaŭ forta deziro de resaniĝo !*

**Ĝiz el Lamark :**

Jen perpleksiga titolo : "virinoj kaj armeoj" ! Laŭdifine, "virinoj" devus esti "inseksaj, maturaj anoj de inteligenta spe-cio", dum la alia vorto rilatus al la MILITistaro(j) de la lando ŝajnus evidente, ke la du konceptoj malamikas inter si. Saĝa estulo konas rimedojn pli raciajn ol la militajn por solvi la kontraŭdirojn kaj la ĝenojn de la kunvivado sur la sama pla-nedo. Des pli ke la MODERNA milito ne plu estas "heroa" sed nur ege malŝpara kaj detrua je riĉfontoj.

Armeo, kiu nuntempe sin pretigas por milito, estas pruvo, ke la registaro ne konsistas el prudentaj homoj.

Antaŭ kelkaj jardekoj iu asertis ankoraŭ, ke "milito estas la higieno de la mondo". Sed nuntempe ni posedas tiel efikajn "desinfektilojn", ke milito ja povus igi la mondon perfekte pura kaj tute higiena. La ununura bedaŭrindaĵo estus, ke kom-



preneble neniu homo supervivos, kiam eĉ la mikroboj estos forpasintaj, en tiu estonta Tero tre kontentige steriligita : imagu, ke NENIU plu suferos pro malvarmumoj, febroj, variolo, kancero, cigared-fumo, ktp.

Sed mi malklare sentas, ke "saĝa" specio devus ĉiel peni por trovi solvon pli bonan ol la mem-ekstermadon !

Ekzemple, oni povus konsideri, ĉu ne eblus krei ARMEON, kiu vere protektu la teritorion al ĝi konfiditan, defendante la montojn, la valojn, la arbarojn, la lagojn, riverojn kaj marojn, kontraŭ la senskrupule rabema agresado de la egoismo de la nuna generacio, atencanta la vivrajton de la estontaj. Kial virino ne fierus esti soldato aŭ oficiro en tia "**verda**" viv-protekta armeo ?

Dum la soldatservo oni ja lernus DEFENDAJN TEKNIKOJN (ĉar la proverbo "**Se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos**" valoras bedaŭrinde ankor' hodiaŭ kaj por la individuoj kaj por la ŝtatoj) sed oni nepre **ne** lernus ŝafe obei la ordonojn plej maljustajn kaj stultajn, mortigi homon, kies sola kulpo estis naskiĝi en apuda lando, ktp.

Eĉ, la soldatoj lernus, ke ordono KONTRAŬ la principoj de la Defenda Armeo devas nepre esti malobeata ; la oficiroj lernus "tenti" la soldatojn, por kontroli, ĉu ili obeas la justajn ordonojn kaj malobeas la maljustajn : defend-armeo ne bezonas karnajn aŭtomatojn, sed plenkonsciajn **homojn** kun hardita kuraĝo kaj bona funkcianta menso.

Se iu dubas pri la neceso de defend-armeo, tiu povus trovi bonan modelon en sia propra korpo : ĝi estas organismo konsist-anta el sennombraj vivantaj ĉeloj, ĉiu el ili okupanta sian "laborpostenon" ne nur por sia propra utilo sed ankaŭ por la vivo de la tuta organismo ; kaj en ĝi vagas "legioj" de leŭko-citoj, pretaj alfronti infekto-malamikon kaj batali kontraŭ ĝi, eĉ kiam ĝi ege superfortas.

Se vi ne havus tian armeon, vi mortus pro infekto, eble post unu kiso... Do, ĝis ne plu ekzistos homoj, kiuj emas konduti kiel pesto-mikroboj, devos ekzisti homoj, kiuj DEVAS konduti kiel leŭkocitoj.

Kaj se virino sentas sin kapabla fariĝi bona "leŭkocito", kial ŝi ne devus provi ?

***Jakelino Lépeix :*** *Ne al ĉia diskriminacio !*

*La enkonduko de Suzanna estas tipa argumentaro de pacistino de ŝia generacio : ni, virinoj, donas vivon, do ni ne povas partopreni en institucio, kiu donas morton. Ĉar mi mem neniam gravediĝis, kaj tre verŝajne neniam gravediĝos, mi*

*sentas min malpli donanto de vivo, ol estas tiuj el miaj fratoj, kiuj patriĝis. Ekzemple, jam antaŭ la naskiĝo de sia bebo, mia frato Alano kaj lia edzino Brigita decidis, ke tuj post la fino de ŝia ferio post patriniĝo, li restos hejme por zorgi pri la infano. Kiam ili sciigis tion al mia patrino, ŝi dubis, ĉu mia frato tion kapablos. Kelkajn monatojn post la naskiĝo de mia nevino, mia patrino diris al mi: "Se mi ne vidus, kiel Alano zorgas pri Anaïs, mi ne kredus, ke li povas esti tiel milda kun bebo". Okaze de la pasinta kristnasko, Anaïs ricevis sian unuan libron. Mi ne scias, ĉu Alano aŭ ĉu Brigita aĉetis tiun libron : verŝajne ili kune decidis pri la maniero eduki la infanon. Brigitan gravedigis nek la Sankta Spirito nek la ministro pri nacia defendo, sed la viro, kiun ŝi amas, kaj kiu ŝin amas. La decidon gepatriĝi ili faris kune. Tial mi pensas, ke pri eventuala naskostriko decidu ne virinoj, sed paroj. Se oni kredas la statistikojn, naskostriko estas ĝenerala fenomeno en Eŭropo : en multaj landoj la nombro de naskoj ne plu superas tiun de mortoj. Ĉu tiu fenomeno estas radikala maniero certigi la neeblecon de militoj ? Jes certe, se ĝi estas ĝenerala : se neniu paro plu faros infanon, la milito ne eblos, ĉar ne plu ekzistos la homaro !*

*Mi imagas, ke post 20 jaroj Anaïs trovos polvokovritajn numerojn de "Laŭte!", ilin metos en sian tradukaŭtomaton kaj pensos : "Reale onjo Jakelino havis ideojn tipajn por sia generacio : kial ŝi tiom insistis, ke la Scienca Progreso ne alportis nur avantaĝojn ? Mia konkubo kaj mi ĵus ricevis la rezulton de nia lasta sanbilanco : ni ambaŭ fartas optimume. Do baldaŭ mi telefonos al la embriofabriko por rendevuo : oni prenos ovolojn de mi kaj spermon de li. Post du aŭ tri jaroj, se ni plu vivos kune kaj se nia socia situacio estos stabila, ni petos, ke oni eltiru unu el la embrioj el la frostoŝranko kaj metu ĝin en gravedmaŝinon, por ke post la necesa tempo ni gepatriĝu. Nekredeble estis la vivo de virinoj en la pasinta jarcento : ekzemple, onjo Jakelino iam diris al mi, ke ŝia patrino (do mia avino) jam aĝis 14 jarojn, kiam ŝi unuafoje instaliĝis en domo kun elektro. Antaŭ tiu aĝo, ŝi brodis littukojn je la lumo de petrollampo. Kaj kiam mi pensas, ke por mia naskiĝo eĉ necesis kirurgie malfermi la ventron de mia kompatinda patrino !... Komputilo, ĉu en 1983 en Francio jam ekzistis anestezio ?... Ha jes, do, delonge. Estas por mi malfacile orientiĝi pri la datoj de la diversaj inventoj, mi havas la impreson, ke la 20a jarcento estis kvazaŭ ŝtonepoko : malfermi ventron por eltiri la bebon, jen afero, kiun mi ne kredus, se mia patrino ne ŝajnus tiel sincera".*

*Ne nur la situacio de la virinoj evoluis, sed ankaŭ la teknikoj de la defendo. La motivo, kial nur viroj soldatiĝas, estas nun ideologia (mitologio pri vireco), sed la origino estis biologia konsidero : antaŭ kelkaj jarcentoj, por ke du homoj atingu la aĝon, kiam oni povas komenci seksan aktivadon, necesis, ke virino gravediĝu 10 aŭ 12-foje. Ankaŭ la mamnutrado estis pli longa ol nun (laŭdire, la Korano mencias dujaran mamnutradon). Aliflanke, la milito konsistis el interhomaj bataloj, kiuj postulis fortikecon. Virino konstante graveda aŭ mamnutranta ne povis do efike partopreni militon. Tiu biologia maleblo ne plu ekzistas, unuflanke pro evoluo en la vivo de virino, aliflanke pro la evoluo de la defendmetodoj*

- *atomarmiloj : eĉ graveda virino povas premi butonon*
- *biologiaj, kemiaj, meteorologiaj armiloj : verŝajne ankaŭ tiujn teknikojn povas uzi virino*
- *popola milicio : ĉiuj maldekstraj grupetoj, kiuj volas armilojn por fari la grandan Revolucion, kiu definitive certigos la feliĉon de la homaro, insistas, ke en tiu Revolucio partoprenos ankaŭ virinoj (antaŭ nelonge, la franca televido montris la trejnadon de virinoj en Kubo)*
- *popola neperforta defendo : ankaŭ la adeptoj de tiu defendmetodo insistas, ke partoprenus en ĝi la tuta popolo, inkluzive de la virinoj.*

*Mi samopinias kun Ĝiz, ke defendo necesas. Mi persone preferus, ke oni realigu reton de neperforta defendado, sed tio ne eblas per nura spontaneco, necesas la partopreno de la tuta popolo, kaj tio eblas nur post vasta diskutado pri la defendo de la kolektivo. Se mia popolo elektos alian teknikon por sin defendi, mi eventuale rifuzos defendservon pro miaj moralaj konceptoj, sed ne pro la fakto, ke mi estas virino.*

**J. G. :**

Laŭ mi, tiu temo prezentas plurajn aspektojn. Por la antaŭaj generacioj la militservo estis por multaj junuloj la tempo de la "aventuro", de la "regiment-amikoj", ĉar la personoj tre malmulte forlasis la hejmon, krom por tiu periodo. Estis "la bona tempo" miksata kun la juneco. Nur kelkaj aktivuloj propagandis kontraŭ la militservo kaj vidis la rilaton "armeo = milito".

Nun la junuloj, kiuj havas aliajn rimedojn por renkonti amikojn, vojaĝi..., konsideras plejparte la militservon kiel perditan tempon, aliaj, pli konsciaj, kiel stultigilon. Malpli-

multo ekkonscias pri la rilato armeo = milito kaj petas la civilan servon (nun permesatan) aŭ la tutan militrifuzon (malpermesatan kaj severe subprematan). La problemo estas, kio estas inda je defendo kaj kiamaniere ĝin fari.

Laŭ mi, la nura defendinda afero estas la libereco de la individuoj kaj de la liberaj asocioj kontraŭ ĉiuj fanatikuloj, dogmemuloj. Ĉu armeo taŭgas por tio ? Mi vere dubas, ĉar ĝi estas la prototipo pri neado de ĉiuj individuaj rajtoj ! Kelkaj proponas miliciojn kun elektitaj oficiroj, egalaj salajroj, ktp, kiel tio okazis dum la Hispana Milito, sed en nia periodo de nukleaj armiloj kaj aliaj teknikaj rimedoj, ĉu tiaj "popolaj" armeoj estus efikaj kaj ankaŭ ne volus konservi la povon kiel oni vidas ĉe la liberigaj movadoj en la Tria Mondo ? La armeo estas uzata precipe ne por la defendo sed por trudi perforte diktatorojn kaj politikan aŭ religian fanatikismon. La nura solvo (se solvo povas ekzisti ?) estus organizado de neperforta defendo, konsciigo pri la danĝero de la nukleaj armiloj (en kelkaj landoj tiu ideo progresas, ĉar ili estas rekte minacataj). Pri tia agado la virinoj povus ludi gravan rolon en la lernejoj, kie ili estas plimultaj kiel edukistinoj), ankaŭ hejme pri la edukado de la infanoj, ktp.

La virinoj estis allogataj antaŭ kelkaj jaroj al militservo, ĉar multaj estis senlaborulinoj kaj oni promesis al ili metion, sed ŝajnas, ke tia logaĵo ne plu funkcias, ĉar mi legis antaŭ kelkaj tagoj en la franca ĵurnalo **"Le Monde"**, ke la nombro de la kandidatinoj je la virina militservo malpliiĝis lastjare je ĉ. 13 %. Tia rezulto malesperigas la ministerion pri la nacia defendo, kiu "alvokas la virinojn partopreni al la renaskiĝo de la defend-spirito en Francio".

*******************************************************

La ĉi-antaŭa debato estis aranĝita per ĉenletero. Kiel kutime, la red. de L! vokas nun novajn interesatojn ekpartopreni en la afero. Tiel diversiĝos la kontribuoj por ankoraŭ pli vigla **"L!"**. Por aniĝi, bonvolu skribi al la red. Dankon !

*******************************************************

**Al abonantoj de SAT-Broŝurservo** : Kiam estos kompletigita la ĉi-jara broŝurkolekto (vd. p.2!), vi ricevos ĝin en ununura pako, verŝajne ekde oktobro.(Kelkaj el vi jam ricevis la unuajn broŝurojn okaze de la SAT-Amikara kongreso). **Al ne-abonantoj** : Kune kun la julia "Laŭte!" aperos detala katalogeto de la nun disponeblaj broŝuroj. Dio (aŭ diablo) volu, ke ĝi instigu vin mendi aŭ fariĝi de nun broŝurabonantoj! Amen. De mendoj kaj abonoj ja dependas la plufunkciado de la Servo. Kribo



<u>Lina Gabrielli</u> :

## Vagabonde tra Vieno

*Kara sinjoro Klaner, Vi donis al mi du feliĉajn tagojn : hieraŭ kaj hodiaŭ. Aŭ pli bone dirite tri, ĉar per Via akompano al Hofburg, vendredon posttagmeze, mi povis viziti la "ESPERANTO-MUZEON", kie akceptis min sinjoro Hube kaj sinjoro März. Jes, tio estas granda travivaĵo por mi ! Fakte mi povis akurate trarigardi nian Olimpon, legi konatajn nomojn, vidi en konvena loko la portreton de miaj E-gepaĉjoj, Teresa kaj Ernest Edward Yelland, apud tiuj de aliaj gravaj kaj memorendaj pioniroj. Sciante kiom fervore kaj senrezerve agis gesinjoroj Yelland, mi estas dankema al la Muzeo.*

*Sed pri la memoraĵoj kaj la portretoj de Zamenhof kaj de lia familio, mi havas nenion por miri, ĉar Zamenhof estas la kreinto de la universala lingvo : ĉiuj omaĝoj al li estas antaŭviditaj. Mi mem honoras lin per mia tuta koro, per mia tuta memo. Tamen mi demandas al mi : kio estus Esperanto, se neniu homo akceptus ĝian sanktan heroldecon ? Se neniu apudiĝus al la kreinto kaj ne subtenus lin ? Jen kial mia plej granda danko iras al la subtenantoj. Ĉu mi blasfemas, kara sinjoro Klaner ?*

*Ni - Vi kaj mi - iam diris, ke Esperanto estas nia "AMATINO", ke amatino kostas, multe kostas. Ne nur monon, precipe sentojn, zorgojn kaj senĉesan laboron. Ho, jes, senĉesan laboron, kiu estas ankaŭ sufero. Sed al sufero pro amo ni submetiĝas volonte ; kaj en tio ni similas al la gepatroj, kiuj penas pro la idoj. Ni esperantistoj, same kiel la gepatroj, ne povas agi aliel. En nia penado miksiĝas multe da ĝojo, ĝuste pro la amo. Kaj mi tiel eniris en la spiriton de la lingvo, ke mi jam pensas universale. Parolante pri miaj samnacianoj, mi diras "la italoj", tute simple kaj nature. Egalas por mi esti nun en Vieno, antaŭ kelkaj tagoj en Varsovio, iom pli poste en Romo. Same okazas por la homoj : mi ne plu rimarkas ĉu mi parolas kun polo, kun aŭstriano, kun italo, ktp.*

*Jen, nun mi troviĝas en Vieno. Delonge mi promesis tion al mia amikino Wilma Diamant. Mi ne povis pli frue. Sed la 19-an de Januaro, reveninte el Pollando, kiun mi atingis unu tagon antaŭ la Stato milita, mi telefonis al ŝi. Mi intencis resti ne pli ol du tagojn, precipe ĉar ĉiun vendredon mi gvidas E-kurson en Teramo kaj miaj gekursanoj atendis min.*

*La 21-an de Januaro, je la tagmezo, Vi vizitis min ĉe nia*

komuna amikino kaj Vi invitis min al la E-Ekspozicio, kiu de kelkaj tagoj okazas en la kadro de Ekspozicio de libroj por lernejoj. Bedaŭrinde mi estis preta por forveturi. Sed kiam en la stacidomo Wilma kaj mi konstatis, ke la vagonaro jam foriris, mi telefonis al Vi por viziti la E-Ekspozicion. Vi ne estis hejme. Ankaŭ la venontan matenon ne. Tamen la hazardo volis, ke mi, telefonante ankaŭ al la Muzeo, trovis Vin tie. Kaj Vi, malgraŭ Viaj multnombraj taskoj, konsentis akompani min al la Muzeo. Sinjoro Hube agrable akceptis min kaj donis al mi la honoron skribi kelkajn vortojn en la libro de la gravaj vizitantoj ; dum sinjoro März akompanis min al la E-Ekspozicio, kie Vi deĵoris.

Kiel vigle Vi donacis al la vizitantoj la "E-gramatikon" de Hugo Stejner kun aliaj valoraj propagandiloj ! Je la 18-a horo, kiam la Ekspozicio fermiĝis, Vi akompanis min al la Esperanto-Federacio kie, malgraŭ la malfrua horo, estis la sekretario kun aĝa sinjoro kaj du junuloj, unu el kiuj japano, ĵus alveninta al Vieno. Kiom da vojo ni faris ! Kiom da veturiloj ni supreniris ! Laŭ mia kalkulo naŭ kaj ĉiuspecajn, ankaŭ subterajn ! Ho, kiel alloga estas Vieno kun la larĝaj stratoj, kun la imponaj domoj, kun la plenplenaj butikoj elegantaj ! Ne ĝenis la neĝo fronte al tiuj grandaj emoci-travivaĵoj ! Finfine, mi iom gustumis de la beleco de tiu ĉi urbo, kiun aliajn fojojn mi apenaŭ travidis tra la vitroj de kurantaj aŭtomobiloj, ĉar miaj kunvojaĝantoj nur celis rapidi. Pro tio Vieno ĝis nun montriĝis kiel aro da komplikaj vojoj, da altaj palacoj, da sinjoreskaj domoj kaj nenio pli. Feliĉe, antaŭ Kristnasko 1979, Wilma akompanis min al la Katedralo. Ho, Wilma ! Mi iom ruĝiĝis, kiam mi revenis al ŝi je la 21,15 horo !

Verdire, la plej granda feliĉo ankoraŭ ne venis. Vi promesis nenion. Sed hieraŭ matene Vi telefonis al Wilma por anonci Vian revenon. Kiam Vi frapis al la pordo, mi tuj surmetis mian peltan mantelon kaj la ĉapelon. Vidante tion, Vi proponis resti hejme por trarigardi Viajn kajerojn kaj fotojn pri E-Laboro. Kiom Vi agis dum du jaroj de Via esperantiĝo ! Pasintjare, okaze de la UEF en Budapeŝto, kie ni konatiĝis, Vi diris, ke Esperanton Vi studas de nur unu jaro. Mi pensis pri mia miskompreno. Sed nun, dum Vi parolas pri dujara esperantiĝo, mi povas nur konkludi, ke pro la flueco de la lingvo senerara, Vi estas eksterordinara, vere eksterordinara, kara sinjoro Klaner !

Vi promesis reveni al mi je la 14-a horo por kune foriri,



promenadi, viziti la Monumenton de Zamenhof je la Borza ĝardeno, vidi la eksteraĵon de la Pola Instituto, ĉar sabate posttagmeze ĝi estas fermita, kaj aliajn interesajn lokojn. Vi estis tre akurata en Via programo. Unue ni vojaĝis per tramo. Poste ni alvenis al la monumento lante, por ke ni ne glitu pro neĝo, kaj mi apogis min al via brako. Ni staris antaŭ la monumento kun religia respekto kaj Vi ame forigis la neĝon de la marmoro. Kaj poste, piede, ni faris nian malgrandan ringon apud la granda ringo. Mi ne laciĝis. Vi montris gravajn vidindaĵojn, galeriojn, internaĵojn kun broditaj plafonoj, eĉ ponton en "junuleca stilo". Frapis min apudeco de brunaj kaj verdaj palacoj pro la ĉarma kontrasto. Ĉi tiun vesperon, en kafejo, antaŭ la adiaŭo, Vi diris, ke per letero Vi priskribos la itineron de nia promenado. Tiam mi scios, kion ni vidis hieraŭ ; dume la ideo sugestis tiun ĉi leteron al Vi, kiam mi ankoraŭ estas en Vieno kaj sub miaj impresoj.

Fine, hieraŭ, kiel krono de nia plezurado, iom romantika pro neĝo en la stratoj garnitaj de skeletaj, blankornamitaj arboj, kies siluetoj tremis pro frosto, Vi proponis al mi viziti Grinzing por gustumi duonglason da vino ! Mi neniam aŭdis paroli pri Grinzing, pro tio mi eĉ ne supozis ĝian ĉarmon en la krepusko, kiam ekestas delikataj lumigiloj, kiuj vivigas la glaciaĵon kaj kreas fabelan atmosferon kun Mannengasse gvidanta al la preĝejo. En la Gasthaus, la vino brilis en la travidebla kristalo, dum bongustis la aromo de la vinbero.

Wilma ne volis veni kun ni kaj ni klopodis rehejmiĝi pli frue, por ke ŝi ridetu pro nia kunesto. Ŝi akceptis Vian inviton por hodiaŭ kaj mi rakontis al ŝi pri niaj travivaĵoj. Sed ŝi volis iri tuj dormi, por esti freŝa okaze de la vizito al la Arta Muzeo.

Kaj Vi alvenis kun bonaj surprizoj. Unue Vi ŝoforis grandan, flavan aŭtomobilon ; tiom grandan, ke ni povis sidi triope en la unua vico. Vi ridetis kaj lerte iradis tra la urbo en kvieta dimanĉa mateno, sur kiu faladas la neĝeraj plumetoj. Mi viŝis la vitron por vidi pli klare kaj vaste.

En Placo Maria Teresa, fronte al la monumento, ni eliris kaj paŝis prudente ĝis la Palaco de la Arta Muzeo. Kiel grandioza ĝi estas ! Kiajn ornamaĵojn kaj valoraĵojn ĝi ampleksas ! Tuŝante la skulptaĵon de Canova, alte de la ĉefa ŝtuparo, mi sentis ĝin kvazaŭ vivanta sub la kareso de miaj emociplenaj manoj ! Tiu fenomeno ne estas raraĵo por mi, kiam mi profunde sentas. Kaj nun mi ne priskribas la Muzeon.

*Vi ĝin konas. Cetere la tasko estus peza por mi kaj ne alirebla. Mi rakontas nur impresojn.*

*Estante jam je la deka horo, ni havis nur du horojn je nia dispono ; pro tio Vi atentigis min, ke mi ne staru longe ĉe iu pentraĵo, alie mi ne povus havi almenaŭ la impreson de la tuta Muzeo. Mi renkontiĝis kun multe da italaj pentristoj, kies verkoj plenigas aliajn galeriojn en Venecio, Madrido, en Barcelo, en Antverpeno.. Mi mencias la ĉefajn muzeojn de mi viditajn. Mi batis mallaŭte la manojn por gratuli min, kiam mi rekonis kelkajn pentristojn laŭ la stilo, inter kiuj Raffaello, Domenico kaj Giambattista Tiepolo, Canaletto, Guardi kaj aliajn. Mi ĝuis ankaŭ la flandrajn pentristojn, precipe la rekoneblan Brüghel. Jes, spirita ĝuo penetris min ; kaj mia tuta estaĵo ridis, ne nur la okuloj kaj la lipoj.*

*Poste ni manĝis en restoracio ; kaj kiam mi pensis, ke Vi jam reakompanos Wilma(n) kaj min hejmen, jen la alia surprizo : invito al "HOLIDAY ON ICE" en Wiener Stadt-halle Eingang : Marzpark. La spektaklo estis longa, pli ol tri horoj ! Tri horoj kaj duono ! Mi, meze de vi kaj de Wilma, - ŝi je mia maldekstro konstante laca, Vi je mia dekstro daŭre vigla, - bonŝance mi pensis, ke baldaŭ mi disiĝos kun necerta revido.*

*Fine, kiam Vi, post la kafo en la sama restoracio, premis mian manon por la adiaŭo, mi sentis min denove sur malferma grundo. Sed mi kaŝis mian emocion sub rideto. Kaj mi mangestis, kiam Vi malproksimiĝis. Vi reciprokis dirante la plej sanktan el ĉiuj vortoj : "Vi havas en Vieno* ***amikon*** *!". Mi kredas je tio kaj mi kore dankas, dankegas ! Mi estas preta feliĉigi Vin kaj Wilma(n), kiam vi tion volas. Kaj mi volas esti denove kun vi ambaŭ. Ĉar vi ripetadis, ke printempe kaj somere en Vieno oni povas ĝui koncertojn en la Parkoj ; ke la promenadoj estas facilaj pro la malsekaj stratoj kaj manko de frosto, mi tiam revenos. Kaj mi redonos kion amata kaj amanta amikino povas redoni.*

*Ĝis baldaŭa revido, sinjoro Klaner !*
*Morgaŭ vespere mi foriros.*

*Vieno, 24.1.1982* **Lina Gabrielli**

******************************************************

Juna k nova E-isto dez. korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj, Esperante, Angle, France aù Hispane. Alejandro LOPEZ DE VERGARA Y MENDEZ ; Rb. Gral Franco, Nº 83 - dcha ; E - 38004 SANTA CRUZ DE TENERIFE
ISLAS CANARIAS, HISPANIO.





# VORTOJ DE MALJUNULO

**valo**

## Printempoj

*Marto 1985. Jen alvenas mia 85a printempo. Ĝi rememorigas min pri kelkaj el la 84 antaŭaj.*

*Printempoj de mia infaneco, kiam kun mia patro, frumatene, mi plukis violetojn kaj narcisojn sub la kaŝtanarboj, sur la verda Herbejo de Aleso.*

*Printempoj sur la Cevenaj montoj kun kaprifolioj kaj multspecaj sovaĝaj floroj.*

*Marto 1912 en Tunizo, la bela sunlumo sur la blanka araba urbo kaj la verda monto Zaguam, la rozaj flamengoj sur la pastelkolora lago.*

*Marto 1922 en Florako, kie mi tiam fianĉiĝis. Frostis ankoraŭ, kaj glaciaj stalaktitoj pendis de la rokoj borde de la vojo.*

*Printempoj en Rejnlando. 1923 sur la erikejoj de Ejfelmontoj, sur la bordoj de Rejno kun florkovritaj ĉerizarboj laŭlonge de la vojo inter Lorelej-rokego kaj la vilaĝo Sankt-Goarshaŭsen, kaj la ravaj florĝardenoj en Godesberg. 1924 en la bela ĝardeno de la Kuracdomo de Vizbadeno (Wiesbaden = Banoj en Herbejo) kaj sub la grandaj kverkoj de Taŭnus-montoj.*

*Printempoj en Parizo : tulipoj kaj florantaj hipokaŝtanoj en la urbaj ĝardenoj, kaj la rozoj en Bagatelle.*

*Printempoj en la forstoj kun altaj arboj de la Pariza regiono, kie floras primoloj kaj majkonvaloj. Printempoj en Savojo kaj en Pireneoj, kun alpaj rozoj kaj anemonoj. Printempoj en Vogezoj, kun la* ***al****taj abioj ankoraŭ vestitaj de la vintra blanka prujno.*

*Marta ekvinokso en Bretonio, la furioza sturmo de Oceano al la fortikaj rokoj de la Pinto de Raz.*

*Printempo ĉe la Lazura Marbordo, kun miozotoj kaj*

*ĉiaspecaj bonodoraj floroj.*

*Kaj la belaj printempaj vojaĝoj en miaj unuaj jaroj de emerito. Italio, la ruĝaj lilioj en Florenco, la mirinda luma etoso sur Venecio, la azaleoj sur la Boromeaj insuloj. Hispanio, la odoro de oranĝofloroj ĉirkaŭ Valencio kaj en Andaluzio. Korsikio, la spicaj odoroj de makisoj, la belegaj mar- kaj montpejzaĝoj. Grekio, la ruĝaj papavetoj sur la Akropolo kaj ĉe la teatro en Epidaŭro, la belegaj insuloj, la intensa bluo de la maro. Majorko, denove oranĝfloroj, gigantaj olivarboj, palmoj, ventmuelilojn iel similaj al la grekaj.*

*Nun mi ne plu tiel longe vojaĝas ; mi ĝuas la printempon en Nimo, kun la helverdo de la juna foliaro de celtidoj, kaj la bela Fonto-ĝardeno, kie fama migdalarbo floras jam en februaro, iafoje eĉ en januaro. En la vintro de mia vivo, mi revivas per la memoro ĉiujn belajn pasintajn printempojn, iom nostalgie, sed ne malgaje. La trezoro de belaj rememoroj estas riĉaĵo, kiun oni ne perdas, kaj kiun oni povas ĉiam ĝui. Gejunuloj, amasigu tian trezoron, dum vi junaj estas. Se vi ne povas serĉi belaĵojn en malproksimo, trovu tiujn, kiuj estas apud vi. Malfermu viajn okulojn kaj ĉiujn viajn sensojn, kaj ĉie vi trovos plukindajn florojn. La printempo estos via.*

## Juneco

*Kiam mi estis juna kaj bela... Ne! bela mi neniam estis. Ĉu juna ? Se juneco estas senzorgeco, gajeco, tion mi neniam spertis. Mi estis 14-jara, kiam komenciĝis la granda milito, 18-jara, kiam ĝi finiĝis. Dum tiuj kvar jaroj mi sentis la teruran plagon kvazaŭ en mia karno, kvankam mi sidis malproksime de la batalfronto. Ne, la adoleskantoj de mia generacio ne havis ĝojan, veran junecon. Kaj la postaj generacioj ?*

*Dum du jardekoj italaj adoleskantoj militiste vestitaj kaj armitaj kantis "Giovinezza, giovinezza !" - sed tio estis nur karikaturo de juneco.*

*En 1936, dudek jarojn post la Verdun-batalego, la franca laborista junularo, ĝuante siajn unuajn feriojn, kantis sian esperon pri feliĉa estonteco. Tri jarojn poste eksplodis la dua plej amasmortiga mondmilito. Dum sia adoleska tempo la generacio de miaj gefiloj vivis en timoplena etoso kaj suferis malsaton.*

*De tiam Eŭropo elsangigita retrovis pacon, sed dise en la mondo ĉiam furiozas militoj. Ĉiam oni aŭdas kaj vidas bombardojn, masakrojn kaj morton de amasoj, precipe infanoj, pro malsatego. Dume la grandaj regnoj kaj la malpli grandaj* elspezadas gigantajn monsumojn por amasigi ĉiam pli efikajn mortigilojn. Post la tradicia defilado de trupoj okaze de la 14a de julio, prezidento Mitterrand klarigis, ke Francio sin armadas "por malebligi militon". Samon proklamadas ĉiuj regnestroj en la mondo. Ĉiam la sama doktrino, resumita en la fama formulo "Si vis pacem para bellum" - kies malĝusteco demonstradis jarmiloj da historio.

*La junuloj de la generacio de miaj genepoj vivas sub la konstanta minaco de tiu modernigita glavo de Damokleso. Ili vivas en sento de malsekureco kaj en ĉiutaga zorgo pri senlaboreco kaj mizero. Ĉu tio estas favoraj kondiĉoj por la elvolviĝo de ĝoja juneco ?*

***Valo***

*************************************************************

## Por nia medito : Fragmentoj el leteroj de E. LANTI

*"... Multaj esp-istoj aliĝus al SAT, se ili estus bone, ĝuste informitaj pri ĝi. Kaj mia sperto pli forte konvinkas min, ke la esp-a movado vivos kaj prosperos, nur se ĝi havas ideologian apogilon. La "interna ideo" Zamenhofa ne plu taŭgas ; la sennaciismo devas anstataŭe ludi similan rolon. Sed nepre oni devas eviti, ke la sennaciismo estu samigata kun la sennacieca de nia organizo. Iom post iom la Moskva mistiko perdos sian efikon kaj nuntempe la "popolfronta" influo ŝajnas ne plu tiom forta kiel antaŭ tri-kvar jaroj. Estas tre grave havi ĝustan ideologian pozicion. Kaj SAT ne povas trovi ĝin en la imito de iu ajn politika organizo."* (Letero al kdo B., 4.10.38)

*"... Mi havis la okazon interparoli kun germano, kiu forkuris el Hitlerio antaŭ du-tri jaroj kaj kiu estas fervora Stalinano, kvankam tri fojojn li provis sensukcese atingi, ke oni akceptu lin en Sovetio. Estas apenaŭ kredeble, ke tiu fakto eĉ ne ŝancelis lian fidon kaj admiron por Stalin. Tute same kiel religia kredulo li akceptas aprobe ĉiujn oficialajn klarigojn pri la lastatempaj procesoj en Moskvo. Kaj tiu homo ne estas malinteligenta. Mi tamen trovas klarigon al tia spiritostato : por proletoj ekspluatataj kaj politikaj rifuĝintoj estas ia konsolo, espero, ke almenaŭ sur unu sesono de l' mondo venkis la proletaro kaj ke tie oni preparas liberigan mondrevolucion. Tia iluzio estas ia balzamo. Kaj kiu provas detrui tiun iluzion, tiu povas nur voki malsimpation kaj eĉ malamon*

*al si. Sed la dubo pli-malpli atakas eĉ la kredulojn, kiam oni mencias iajn faktojn. Se oni atingas, ke homoj ekdubu, tio estas atentinda rezulto. Kio estas pli malfacila tasko, tio estas, ke oni devas proponi novan sistemon, rekomendi novan vojon, kio vidigas tre malproksiman celon. Sed almenaŭ oni povas per la sennaciismo forte ligi homojn al esp-o. Same kiel ĉe la komenco de la esp-a movado la Zamenhofa "interna Ideo" ligis la pionirojn kaj kaŭzis la fiaskon de la ida movado."*

(Letero al kdo B., 22.11.38)

*"... La Moskva mistiko estas ne malpli forta ol la Roma kaj ĝi disponas milionojn da rubloj por sia blufado, dum mi havas nur mian voĉon. Sed la vero restas la vero kaj post pli-malpli longa tempo ĉiu komprenos, ke Lanti k.a. estis pravaj. La ruĝa faŝismo estas pli danĝera ol la nigra kaj bruna, tial ke ĝi kaŝas sin malantaŭ masko de l' socialismo. La etiketoj sur boteloj de vinaĉo estas pli gravaj ol ties enhavo por personoj, kiuj ne havas delikatan kaj edukitan palaton. Se vi kaj aliaj povas trinki la Stalinan vinon kiel socialistan trinkaĵon, nu, trinku plengorĝe, drinku, ebriiĝu kaj estu feliĉa. Kaj eĉ kompateme rigardu al la herezuloj kiel mi, kies palato estas tro delikata por povi ĝuadi la sangan trinkaĵon Stalinan."*

(Letero al kdino H., 10.1.39)

*"... Ridinda estas via diro, ke vi "ne rajtas varbi al SAT gesamideanojn Hanks" pro tio, ke ili mastrumas fabrikon. Ĉiu persono, eĉ miliardulo, kiu aprobas la Statuton de nia organizo rajtas kaj eĉ devas aliĝi."* (Letero al kdino H., 30.1.39)

*"... La logiko, la racio devas superi la tradicion en nia arte-farita lingvo. Aliel !?..."* (februaro 39)

*"... ne malatentu jenan historian fakton : en ĉiuj gravaj movadoj religiaj aŭ sociaj, la virinoj ludis rolon. Tipa ekzemplo estas la amo de Maria Magdalena, kiu amegis Jezuon. Ne mis-komprenu min ; mi volas diri, ke virinoj povas tre utili en iu ideala movado, se ili estas lerte gvidataj. La religiaj movadoj jam delonge tute forfalus, se virinoj per apartaj organizoj ne forgesigus iagrade la ekspluatemon de pastroj. Pensu, ekzem-ple, pri "Les Petites Soeurs des Pauvres". Vi scias, ke mi estas Alfesto (serĉanto) kaj mi kredas esti trovinta jenan veron : homoj bezonas religion ; religio eĉ estas necesa por la bono de la socio. Sed ne erarkomprenu min ; mi uzas la vorton laŭ ĝia etimologia senco :* ***re ligare.*** *La problemo estas trovi ligilon, kiu ne estu dogma kateno... Eble iam pli poste oni povos seri-oze pensi pri aliigo de la Statuto de SAT..."* (Let. al B., 22.3.39)



## ANALIZA GRAMATIKO (5)

***************************

### La (mal)supereca komparacio

En ĝuste uzata Esperanto, la sintakso estas ĉiam matema-tike preciza... se oni konsideras ĉiuokaze la elipsojn, la preter-silentitajn aŭ subkomprenatajn vortojn. Sen elipso, por esprimi la superecan aŭ la malsuperecan komparativon rilate al kvalifiko (adjektiva aŭ substantiva), al adverbo aŭ al kvan-to, oni ĉiam devas uzi, krom la adverbon "pli" aŭ "malpli" kaj la konjunkcion "ol", la adverbo KIOM, ĉar la (mal)super-ecaj komparoj ĉiam senescepte estas pri grado aŭ kvanto ; tamen plej ofte KIOM estas prisilentata.

Ekzemploj plejgrandparte Zamenhofaj :

Du homoj povas pli multe fari, ol (kiom povas fari) unu - Li ne estas generalo, sed ne malpli valoras, ol (kiom valoras) generalo. -- Taksi iun pli alte, ol (kiom) li meritas. -- Pli granda estas mia puno, ol kiom mi povas elporti. -- Tio estas pli da pomoj, ol kiom (da pomoj) ni povas manĝi. -- Pli da nuboj, ol kiom la nordo scias. -- Ekzistas en ĉiel' kaj sur la tero pli da aferoj, ol (kiom) en la lernejoj instruas la filo-zofoj.

Kelkafoje KIOM ne estas pretersilentebla, precipe en iuj komparoj kun kaj pro la akuzativo.

Ekzemplo :

Vi ne renkontos tie ŝtofojn pli delikatajn, ol kiom estas tiuj ĉi.

Post "ol", neniam estas uzebla la adverbo "kiel" anstataŭ "kiom", ĉar nur tiu ĉi esprimas la komparatan gradon aŭ kvanton.

Ekzemploj :

Li alnaĝadis multe pli proksime al la tero, ol kiom kuraĝus iu alia. -- Mi havas pli bonajn okulojn, ol kiom oni pensas. (Zamenhof en ambaŭ kazoj nekonvene uzis "kiel", sed la kom-paro ne estas pri la maniero, kiel oni kuraĝus aŭ pensas, sed pri la gradoj de proksimeco kaj de boneco.

Ne forgesu, ke nur IOM, TIOM, KIOM, ĈIOM kaj NENIOM esprimas la gradon kaj la kvanton.

**L. Mimó**

*Nia novelo :*

**Guy de MAUPASSANT (1850-1893)**
el la franca : Daniel LUEZ

# LA MODELINO

*Rondforma kiel lunarko, la urbeto Etretat, kun siaj blankaj klifoj, siaj blankaj rulŝtonetoj kaj sia blua maro, ripozis sub la suno de granda julia tago. Ĉe ambaŭ pintoj de tiu arko, la du pordoj, la malgranda dekstre, la granda maldekstre, antaŭenigis en la kvietan akvon, la unua sian nanan piedon, la alia sian kolosan gambon ; kaj la "nadlo"(1), preskaŭ tiel alta kiel la klifo, larĝa malsupre, maldika ĉe la supro, direktis al la ĉielo sian akran pinton.*

*Sur la plaĝo, laŭlonge de l' maro, sidanta homamaso rigardis la banantojn. Sur la teraso de la kazino, alia amaso, sidanta aŭ paŝanta, eksponis sub la lumplena ĉielo ĝardenon de tualetoj, kie pompis ruĝaj kaj bluaj sunombreloj, broditaj per grandaj silkaj floroj.*

*Sur la promenejo, fine de la teraso, aliaj homoj, la kvietuloj, la serenuloj, malrapide paŝis, for de la eleganta amasego.*

*Junulo, konata, fama, iu pentristo, Johano Summer, paŝis kun malgaja mieno apud malsanula veturileto, kie kuŝis juna virino, lia edzino. Servisto malrapide ŝovis tiun specon de rulseĝo, kaj la kriplulino kontemplis per malgaja okulo la ĝojon de l' ĉielo, la ĝojon de l' tago, kaj la ĝojon de la aliaj.*

*Ili ne parolis. Ili ne rigardis unu la alian.*
*"Ni haltu iomete", diris la virino.*
*Ili haltis, kaj la pentristo sidiĝis sur faldseĝo, kiun prezentis al li la servisto.*

*Tiuj, kiuj pasis malantaŭ la paro senmova kaj muta, rigardis ĝin kun afliktita mieno. Disfamiĝis tuta legendo pri sindonemo. Li edzinigis ŝin malgraŭ ŝia kriplaĵo, kortuŝita per ŝia amo, oni diris.*

*Ne malproksime de tiu loko babilis du junaj viroj sidantaj sur kapstano kaj kun la rigardo revema al la horizonto.*

*"Ne, ne estas vere ; mi diras al vi, ke mi bone konas Johanon Summer.*
*- Nu, kial li edzinigis ŝin ? Ŝi ja estis jam kripla ĉe sia edziniĝo, ĉu ne ?*
*- Absolute. Li edzinigis ŝin... li edzinigis ŝin... kiel oni edzinigas, kompreneble, pro stulteco !*

(1) nomo de vertikala pinta roko, tre konata, en Etretat.



*- Kiel do ?*
*- Kiel... sed kiel, amiko. Ne estas kielo. Iu estas stulta, ĉar li estas stulta. Kaj vi ja scias, ke la pentristoj havas kiel specialaĵon ridindajn edziĝojn ; preskaŭ ĉiuj edzinigas modelinojn, malnovajn amorantinojn, unuvorte virinojn difektitajn en ĉiuj rilatoj. Kial do ? Ŝajnus, kontraŭe, ke la konstanta kunestado kun tiu raso de stultulinoj nomataj modelinoj estus devinta mallogi ilin por ĉiam de tiu speco de femaloj. Tute ne. Poziginte ilin, ili edzinigas ilin. Legu do tiun libreton, tiel veran, tiel kruelan kaj tiel belan de Alphonse Daudet : la edzinoj de la artistoj.*

*"Por la paro, kiun vi vidas tie ĉi, la akcidento okazis laŭ maniero speciala kaj terura. La virineto ludis komedion aŭ pli ĝuste dramon timigan. Ŝi riskis la tuton, unuvorte. Ĉu ŝi estis sincera ? Ĉu ŝi amis Johanon ? Ĉu oni povas scii tion ? Kiu do povos precize determini la kvanton de akreco kaj la kvanton de realeco en la agoj de la virinoj ? Ili estas ĉiam sinceraj en eterna movebleco de impresoj. Ili estas flamiĝemaj, krimaj, sindonemaj, admirindaj, kaj malnoblaj, por obei nepercepteblajn emociojn. Ili senĉese mensogas, nevole, nescie, nekomprene, kaj ili havas, kun tio, malgraŭ tio, absolutan sincerecon de sensaĵoj kaj de sentoj, kiun ili manifestas per decidoj violentaj, neatenditaj, nekompreneblaj, frenezaj, kiuj konfuzas niajn rezonadojn, niajn ekvilibrajn kutimojn kaj ĉiujn niajn egoismajn kombinadojn. La neantaŭviditeco kaj abrupteco de iliaj decidiĝoj faras, ke ili restas por ni nedeĉifreblaj enigmoj. Ni ĉiam demandas al ni : "Ĉu ili estas sinceraj ? Ĉu ili estas malsinceraj ?".*

*"Sed, amiko, ili estas samtempe sinceraj kaj malsinceraj, ĉar estas en ilia naturo esti ambaŭ ĝisekstreme kaj esti nek unu nek la alia."*

*"Rigardu la rimedojn, kiujn uzas la plej honestaj por elpeti de ni kion ili volas. Ili estas komplikaj kaj simplaj, tiuj rimedoj. Tiel komplikaj, ke ni neniam divenas ilin antaŭe, tiel simplaj, ke, estinte ties viktimoj, ni ne povas deteni nin miri pri ili kaj diri al ni :*
*"Kiel ? ŝi tiel stulte trompis min ?"*
*"Kaj ili ĉiam sukcesas, mia kara, precipe kiam temas pri tio, ke oni edzinigas ilin.*
*"Sed jen la rakonto pri Summer :*

*La virineto estas modelino, kompreneble. Ŝi pozis ĉe li. Ŝi estis beleta, eleganta, ĉefe, kaj posedis, laŭdire, dian*

*talion. Li enamiĝis al ŝi, kiel oni enamiĝas al ĉiu iom loga virino, kiun oni ofte vidas. Li imagis al si, ke li amas ŝin per sia tuta animo. Tio estas stranga fenomeno. Tuj kiam oni deziras virinon, oni sincere kredas, ke oni ne plu povos malhavi ŝin dum sia tuta cetera vivo. Oni ja tre bone scias, ke la afero jam okazis al oni ; ke la malinklino ĉiam sekvis la posedon ; ke necesas, por povi foruzi sian ekzistadon apud alia homo, ne brutala fizika apetito, ja tre baldaŭ estingiĝinta, sed akordo de la animo, de la temperamento kaj de la humoro. Necesas esti kapabla distingi, en la logo, kiun oni spertas, ĉu ĝi venas de la korpa formo, de iu senca ebrieco aŭ de profunda ĉarmo de la spirito.*

*Unuvorte, li kredis, ke li amas ŝin ; li faris al ŝi amason da promesoj pri fideleco kaj li vivis tuttempe kun ŝi.*

*Ŝi estis vere afabla, dotita per tiu eleganta naivegeco, kiun ofte havas la Parizaninetoj. Ŝi pepis, babilis, diris stultaĵojn, kiuj ŝajnis spritaj pro la komika maniero, kun kiu ili estis eldiritaj. Ŝi havis ĉiumomente graciajn gestojn taŭgajn por ĉarmi pentristan okulon. Kiam ŝi levis la brakojn, kiam ŝi klinis sin, kiam ŝi eniris veturilon, kiam ŝi etendis la manon al iu, ŝiaj movoj estis perfektaj pro ĝusteco kaj trafeco.*

*Dum tri monatoj, Johano ne konsciis, ke, ĉion konsiderante, ŝi similis al ĉiuj modelinoj.*

*Ili luis por la somero dometon en Andrésy.*

*Mi ĉeestis, iun vesperon, kiam ekĝermis la unuaj maltrankviloj en la menso de mia amiko.*

*Ĉar estis radia nokto, ni volis fari promeneton ĉe la riverbordo. La luno verŝis en la tremantan akvon pluvon da lumo, dispecigis siajn flavajn rebrilojn en la kirlojn, en la fluon en la tutan larĝan riveron lantan kaj fuĝantan.*

*Ni laŭiris la bordon, iom ebriigitaj per tiu svaga ekzaltiĝo, kiun ĵetas en nin tiuj revaj vesperoj. Ni estus volintaj plenumi superhomajn aferojn, ami nekonatajn estaĵojn, rave poeziajn. Ni sentis boli en ni ekstazojn, dezirojn, strangajn sopirojn. Kaj ni silentis, penetritaj de la serena kaj viva malvarmeto de l' ĉarma nokto, de tiu freŝeco de la luno, kiu ŝajnas trairi la korpon, ĝin penetri, bani la menson, ĝin parfumi kaj trempi en feliĉo.*

*Subite Jozefino (ŝi nomiĝas Jozefino) eligis krion :*



*"Ho! ĉu vi vidis la grandan fiŝon, kiu saltis tie ?"*
*Li respondis nerigardante, nesciante :*
*"Jes, karulino."*
*Ŝi koleriĝis.*
*"Ne, vi ne vidis ĝin, ĉar vi staris kun turnita dorso."*
*Li ridetis.*
*"Jes, estas vere. Estas tiel bone al mi, kiam mi pensas pri nenio."*

*"Se vi opinias, ke tio estas amuza, via promeno dirante nenion ! Oni parolas, kiam oni ne estas stulta."*

*Li ne respondis. Tiam, bone sentante, dank'al sia perversa virina instinkto, ke ŝi estas lin furiozigonta, ŝi ekkantis tiun incitantan arion, per kiu oni tiom lacigis la orelojn kaj la spiriton dum du jaroj :*

**Je regardais en l'air.**
*(mi rigardis supren)*

*Li flustris :*
*"Mi petas, silentu."*
*Ŝi eldiris, furioza :*
*"Kial vi volas, ke mi silentu?"*
*Li respondis :*
*"Vi fuŝas al ni la pejzaĝon."*

*Tiam okazis la kverelo, la abomena, stulta kverelo, kun la neatenditaj riproĉoj, la malĝustatempaj rebatoj, kaj poste la larmoj. Ĉio preterpasis. Ili hejmeniris. Li lasis ŝin iri, sen repliki, rigidigita per tiu dia vespero, kaj konsternita per tiu ŝtormo da stultaĵoj.*

*Tri monatojn poste, li fortege baraktis en tiuj nevenkeblaj kaj nevideblaj ligiloj, per kiuj tia kutimo implikas nian vivon. Ŝi tenis lin, premis lin, martirigis lin. Ili kverelis de l' mateno ĝis la vespero, insultis unu la alian kaj interbatiĝis.*

*Finfine, li volis likvidi la aferon, je kia ajn kosto ĉesigi la rilatojn kun ŝi. Li vendis ĉiujn siajn pentraĵojn, prunteprenis monon de siaj amikoj, kolektis dudek mil frankojn (li estis ankoraŭ malmulte konata) kaj lasis ilin iun matenon sur la kameno kun adiaŭa letero.*

*Li venis rifuĝi ĉe mi.*

*Ĉirkaŭ la tria posttagmeze, iu sonorigis. Mi iris malfermi. Virino saltis al mia vizaĝo, forpuŝis min, eniris kaj penetris en mian atelieron : estis ŝi.*

*Li ekstaris vidante ŝin aperi.*

*Ŝi ĵetis al liaj piedoj la koverton kun la monbiletoj kun vere nobla gesto, kaj, per abrupta voĉo :*

*"Jen via mono. Mi ne volas ĝin."*

*Ŝi estis palega, tremanta, certe preta je ĉiuj frenezaĵoj. Koncerne lin, mi vidis lin ankaŭ paliĝi, paliĝi pro kolero kaj incitego, preta, eble, al ĉiuj perfortoj.*

*Li demandis :*

*"Kion vi volas?"*

*Ŝi respondis :*

*"Mi ne volas esti traktata kiel publikulino. Vi plorpetis min, vi prenis min. Mi petis nenion de vi. Konservu min!"*

*Li stamfis.*

*"Ne, estas troige! Se vi kredas, ke vi..."*

*Mi estis ekkaptinta lian brakon.*

*"Silentu, Johano. Lasu min fari."*

*Mi iris al ŝi, kaj dolĉe, iom post iom, mi prudentigis ŝin, mi malplenigis la sakon de la argumentoj, kiujn oni uzas en tia cirkonstanco. Ŝi senmove aŭskultis min, kun fiksaj okuloj, obstina kaj muta.*

*Fine, ne plu sciante kion diri, kaj vidante, ke la kverelo estis malbone finiĝonta, mi ekpensis pri lasta rimedo. Mi eldiris :*

*"Li ĉiam amas vin, knabino ; sed lia familio volas edzigi lin, kaj vi komprenas!..."*

*Ŝi havis eksalton :*

*"Ha!... ha... nun mi komprenas..."*

*Kaj turnante sin al li :*

*"Vi... vi... edziĝos?"*

*Li senhezite respondis :*

*"Jes."*

*Ŝi faris unu paŝon :*

*"Se vi edziĝos, mi mortigos min... ĉu vi aŭdas?"*

*Li eldiris levante la ŝultrojn :*

*"Nu, mortigu vin!"*

*Ŝi klare prononcis du aŭ trifoje, kun la gorĝo premita per terura angoro :*

*"Vi diras?... vi diras?... vi diras?... ripetu!"*



*Li ripetis :*

*"Nu, mortigu vin, se tio plezurigas vin!"*

*Ŝi reekparolis, ĉiam terure pala :*

*"Ne necesus defii min pri tio. Mi ĵetus min tra la fenestro."*

*Li ekridis, alpaŝis al la fenestro, malfermis ĝin kaj, salutante kiel persono, kiu faras ceremoniojn por ne pasi unua :*

*"Jen la vojo. Post vi!"*

*Ŝi rigardis lin dum unu sekundo per fiksa okulo, terura, freneza ; poste, eksvingante sin, kvazaŭ por transsalti heĝon en la kampoj, ŝi pasis antaŭ mi, antaŭ li, transsaltis la balustradon kaj malaperis...*

*Mi neniam forgesos kiel impresis al mi tiu malfermita fenestro, post kiam mi vidis ĝin transsaltita per tiu falanta korpo ; ĝi ŝajnis al mi post unu sekundo granda kiel la ĉielo kaj malplena kiel la spaco. Kaj mi instinkte retropaŝis, ne kuraĝante rigardi, kvazaŭ mi mem estus falonta.*

*Johano, konfuzegita, ne faris unu geston.*

*Oni realportis la povran knabinon kun ambaŭ kruroj rompitaj. Ŝi neniam plu paŝos.*

*Ŝia amanto, freneza pro rimorso kaj eble ankaŭ pro dankemo, reprenis kaj edzinigis ŝin.*

*Jen, mia kara."*

*Vesperiĝis. La juna virino, al kiu estis malvarme, volis foriri ; kaj la servisto rekomencis puŝi direkte al la vilaĝo la kriplulan veturileton. La pentristo paŝis apud sia edzino kaj ili, ekde tuta horo, ne interŝanĝis eĉ unu vorton.*


*(17 decembro 1883)*

********************************************************

**SOLVO de la krucvortenigmo de n-ro 59 :**

**Hor.** : 1. OFTALMOLOG. 2. KARBUNKOLA. 3. URANO. AZ. 4. IE. UZAĴO. 5. VIRGULINOJ. 6. IDEA. ANĜEL. 7. TINCJ. TOLO. 8. RODI. IA. 9. OTA. OD. LA. 10. JEJUNOTOMI.
**Ver.** : 1. OKULVITROJ. 2. FAR. IDIOTE. 3. TRAIRENDAJ. 4. ABNEGACI. 5. LUO. ON. 6. MN. ULA. IDO. 7. OKAZINTA 8. LOZANĜO. LO. 9. OL. ĴOEL. 10. GASOJLOJ.

(Novaj enigmoj plu bonvenaj. Dankon !)



## KRUCVORTENIGMO de Kribo

(r = nur la radiko !)

**Horizontale** : 1. Iama revolucia himno. 2. Membre. Posedata de vi kaj mi. Sufikso. 3. Cifero. Havi kun si (r). 4. Rigidigu la kolumon! Akva herbo (r) 5. Disigi (r). Respondigi negative (r). 6. Peza hidrogeno. 7. E-asocio. Rakontema laŭtulo. 8. Adama kunulino. Refleksivilo. Devote. 9. Orela sekreciaĵo. 10. Bruvorto.

**Vertikale** : 1. Usona ŝtato. 2. Sanga malriĉeco (r). Mov-verbo (r). 3. Rolaro. 4. Prefikso. Sufikso. 5. Fervora. 6. Pronomo. En dieto. 7. Azianino (r). Azia dramo (r). 8. En salado. Slava pastro (r). 9. Okupiĝi. Vi kaj mi. 10. Homa evoluo ĝis la adoltiĝo.

(Tiu aĉe tajpita enigmo estas tamen facila. Nur la 10a vertikale, eble...)

********************************************************

**Maljunulo rakontas :**

## LA BOLIDO

Antaŭ 200 jaroj la mono estis ĉie la vera valoro.

Ĉiu "ŝtato" eldonis nur tiom da papermono, kiom ĝi povis ŝanĝi kontraŭ oro.

Hodiaŭ ĉiuj ŝtatoj eldonas fantaziajn amasojn da papermono, sen devigo ŝanĝi kontraŭ oro. Aliflanke, la ŝtatoj ŜTELAS la "monon" de siaj popoloj per "devaluto".

La ŝtato vendas "nur" 30-oble la prezon de memkostoj la elektran kurenton, "nur" 10- ĝis 20-oble la tunon da akvo, enkasigas "nur" 50% el ĉiuj lupagoj - eĉ de la senlaboruloj - devigas la popolon pagi dekoble de ĝia memkosto la bileton de metroo, fervojoj aŭ aŭtobusoj... tio ĉi sen aĉeti novajn terenojn aŭ konstruigi novajn stacidomojn... permesas, ke la terpomoj estu pagataj 0,40 FF por kilogramo al la enlanda produktisto, por esti revendataj de 4 ĝis 8 FF al la enlanda popolo en butiko... dekoble la prezon de memkostoj la benzinon, tabakon, ktp...

En tiu kondiĉo la ŝtato povas "aĉeti" kanonojn, kiuj "forsendas bolidojn, kiuj kostas ĉiu "nur" 1000 milionojn da dolaroj... kaj mi vin demandas, kion vi faras por ŝanĝi ĉi tion ?

-nn-

********************************************************

LA VENONTA NUMERO APEROS FINE DE JUNIO



# ĈIES VOĈO

## HOMOJ KAJ AŬTOJ

Reĝustigo : en mia unua kontribuo al tiu ĉi rubriko mi ne estis inspirita de nostalgio pri mia junaĝo. Mi bone memoras, kiel malkomfortaj estis la triaklasaj vagonoj, en kiuj mi veturis inter 1906 kaj 1910. Nun, en plena konsento kun Jakelino, mi konfesas, ke la francaj "koraltrajnoj", laŭde reklamitaj siatempe, estas el pluraj vidpunktoj malkomfortaj. Unu sola avantaĝo : ili ruliĝas glate, senskue. Sed en la lastaj jaroj aperis dua generacio de tiuj trajnoj, kun klasikaj kupeoj kaj flanka koridoro, en kiuj oni sidas kaj cirkulas multe pli oportune. Tiuj ĉi iom post iom anstataŭos la unuajn. Tiu elimindo ne estos rapida, ĉar necesos atendi ĝis la unuaj estos eluzitaj. Sur la fervojoj la progreso ne iras rapide, sed konstante. Tute certe la trajnoj en j. 2000 estos tiel komfortaj kiel rapidaj, tre agrablaj. Jam nun estas pli oportune veturi per trajno ol per buso, eĉ per luksaj turismaj ĉaroj kun "kondiĉata" aero.

**Valo**

El teknika kaj estetika vidpunktoj, aŭtomobilo certe estas admirinda instrumento, kvankam la motorkoncepto ne multe progresis ekde sia eltrovo : daŭre ĝi estas brua kaj poluciiga. Ĉiu scias la danĝeron estigitan de plumbo enmetita en la benzinon. Eble tiu fakto profundigos kaj akcelos la esplorojn jam komencitajn por nova motorkompreno. Tio urĝas, ĉefe en la grandaj urboj, kie ni sufokiĝas meze de tiu moderna oksigeno. Ni ne parolu pri la bruo : oni sin kredus en ŝtormo. Kaj tiom da feraĵo gluiĝanta ambaŭflanke de la stratoj aspektas kvazaŭ kolesterolo invadinta arteriojn, ĝis preskaŭa ŝtopo : tre malsanige !

Ĉu ne eblus pli uzi la jam ekzistantajn kolektivajn transportojn ?

Ve, saĝan uzon de aŭto baras potenca bremso : aŭto fariĝis sociala barometro, kaj anstataŭ obeanta servanto ĝi estas nun ĉiam pli postulema despoto.

**Jean-Claude**

## CIRKLOKVADRATURO


## Kiu pravas ? Geometria solvo

*1° - Per rektilo streki horizontalan rekton AB.*

*2° - Per cirklilo streki cirklon kaj determini la perpendiklon CD*

*3° - Fermi la cirklilon ĝis radiusa amplekso, piki ĝin laŭvice ĉe la punktoj ABCD kaj determini la angulojn EFGH de la ekstera kvadrato, rilatigi ilin per rektoj.*

*4° - Streki la diagonalojn EG kaj FH.*






*5° - Piki la cirklilon ĉe la punkto A, malfermi ĝin ĝis la punkto I kaj turni ĝin ĝis la kvadrata latero por determini la punktojn M kaj V. Same procedi ĉe la aliaj punktoj CBD, tiel estas plu determinitaj la punktoj NP, RS, TU.*

*6° - Pare rilatigi per rektoj la punktojn M kaj N, P kaj R, S kaj T, U kaj V. Tiel estas determinitaj la kvar punktoj X1, X2, X3, X4.*

*7° - Rilatigi per rektoj X1 kaj X2, X3 kaj X4, X4 kaj X1. Tiel estas plej simple kaj precize determinita la kvadrato, kies areo ekvivalentas tiun de la cirklo, per nur rektilo kaj cirklilo.*

*RESUMITA KLARIGADO. - Por kvadratigi la cirklon, necesas kvarflanke kunpuŝi ĝin simultane kaj egale. Dum tiu operacio la cirkonferenca kurbeco rektiĝas, la mediana radiuso mallongiĝas kaj la diagonala radiuso plilongiĝas sammezure kiel mallongiĝas la diagonalo de la ekstera kvadrato.*
*Dum la diagonalo mallongiĝas de la angulo F ĝis la angulo X2 la diagonala radiuso sammezure plilongiĝas de la punkto Z ĝis X2. La parto inter J kaj Z ŝuldiĝas al la rektiĝo de la cirkonferenca kurbeco, dum la mallongiĝo de F al X2 ŝuldiĝas nur al la kvarflanka kunpuŝado, kaj rivelas pri la longeco de la segmento Z-X2. Do la centro de la kvadradeto PFRZ deter minita de unu segmento de la oklatero strekebla en la cirklo, estas la preciza angula punkto determinita per la kvadratiĝo de la cirkonferenco.*
*Kiel por ĉiuj geometriaj figuroj, la precizeco estas nur teoria, ĉar ĝi dependas ĉefe de la iloj uzitaj. Per iloj absolute precizaj la precizeco estus absoluta, ĉar la procedo pravas. Cetere en venonta "Laŭte!" mi demonstros, kiel la aritmetika solvo pravigas la geometrian proceCon.*
*Ek al viaj rektiloj, cirkliloj kaj... kalkuliloj !*

*En Eymet 1985/03/22*

***Anonima B.G.D.** )Eymet(*

### En KIOMA jaro ni vivas nun ?

Serioza demando al spertulo pri kalendaroj. Por pliprecizigi la demandon ni atentu la demandan vorton KIOMA ! Temas pri la komenco de la jarcento. Cu la 31a de decembro 1899, aŭ ĉu la 1a de januaro 1901 estis la unua tago de la dutaga jarcento ?

La Gregoria kalendaro komenciĝis post la naskiĝo de Kristo nome je la 25a de decembro, sed en kiu jaro ? Kiomaĝa li estis je la 1a de januaro de la jaro 1 (unu)? Cu nur 7 tagojn,

ĉu tutan jaron + 7 tagojn ? En la unua okazo li naskiĝis en la jaro "NULO" ; en la dua okazo li naskiĝis unu jaro antaŭ la jaro NULO. Se li naskiĝis en la jaro NULO, ni povas diri, ke 1985 estas la 85a jaro de la nuna jarcento ; la jaro 100 estis la centa jaro kaj la 1a de januaro 101 estis la 1a tago de la 2a jarcento. Male, se li naskiĝis en la jaro antaù la jaro NULO (do ekzemple en la jaro X99 kiam la jaro NULO estis X100) tiam ni nun vivas en la 86a jaro de la 20a jarcento.

Eble Hebrea kalendaro montras solvon al ĉi problemo.

19850201 (2K22)

**iea iu**

## KELKAJ KONSILOJ

** Se vi estas kinisto kaj volas, ke via filmo akirigu al vi monon, nepre ataku iun ajn katolikan dogmon (se ĝi iel ajn rilatas al sekso, des pli bone). Unue cenzuremaj katolikoj postulos ĝian malpermeson. Due malkatolikoj protestos, ke ili nepre volas vidi vian filmon. Kaj fine malcenzuremaj katolikoj laŭte diros, ke vidinte vian filmon ili restis katolikaj. Tiel vi akiros spektantojn, kaj ne bezonos malŝpari monon por la reklamo de via filmo.*

** Se vi estas fervora adepto de Le Pen, kaj timas, ke lia veno en vian urbon ne pasiigos la popolamasojn, tuj aliĝu al maldekstra grupeto, kiu disdonas flugfoliojn pri la neceso manifestacii kontraŭ la mitingo. Estos almenaŭ duoble pli da mitinganoj, ol vi esperis, kaj krome ĉiuj amaskomunikiloj montros vian amatan gvidiston.*

** Se vi deziras konvinki viajn samtempulojn, ke Dio ne ekzistas, nepre ne akceptu, ke oni vin nomu ateisto. Postulu, ke oni vin nomu liberpensanto. Kaj se iu nigra kaprino esprimas la ideon, ke ekzistas diferenco inter liberpenso kaj ateismo (1), nomu ŝin dogmemulo, klerikalulo, agento de Vatikano, ktp.*

** Se vi sukcesis fariĝi estro de la plej granda el la kristanaj sektoj, nepre ne akceptu, ke oni nomu vin Jopaŭĉjo. Postulu, ke oni nomu vin "Sankta Patro". Se iu el viaj ŝafoj rimarkas, ke tio estas okulfrape malevangelia sakrilegio, tuj verku enciklikon pri la neceso kredi la dogmon pri infero.*

** Se vi konas la trian sekreton de Fatima, nepre lasu viajn adeptojn kredi, ke ĝi estas tiel grava kaj terura, ke ne eblas ĝin malsekretigi. Se iu esprimas la hipotezon, ke vi silentas nur, ĉar temas pri nekredebla kretenaĵo, verku enciklikon (vidu supre).*



** Se vi volas konvinki la esperantistojn pri la neceso, ke iam malaperu ĉiuj kulturlingvoj escepte de Esperanto (2), fondu asocion, kiu celas meti Esperanton je la servo de la laborista klaso tutmonda, kaj atendu, ĝis ĉiuj ĝiaj anoj fariĝus sennaciistoj per la efiko de la SAT-spirito (efikeco de tiu konsilo ne garantiita de la monda registaro).*

** Se vi estas fervora SAT-ano kaj konstatas, ke post 11-jara aneco iu nigra ŝafino ankoraŭ ne fariĝis sennaciista, verku enciklikon, pardonu, artikolon, pri la neerarebleco de k-do Lanti. Se iu diras, ke ne ekzistas dogmo pri la neerarkapablo de Lanti, nomu lin aŭ ŝin etnaciisto, subfosanto de SAT, ktp.*

***Jakelino Lépeix***

*(1) Laŭ la jakelinista sekto, plej malgranda sekto en la kristanaro (unu adepto) :*
*- la rilato inter liberpenso kaj ateismo estas ekzakte la sama, kiel la rilato inter amo kaj kristanismo;*
*- la simptomoj de paranojo estas similaj ĉe ĉiuj malsanuloj, sendepende de iliaj kredoj.*
*(2) Tiuj, kiuj pensas, ke tio estas erara prezento de la lantia doktrino, bonvolu rigardi la difinon de "sennaciismo" en PIV (ĝi troviĝas je la rubriko : nacio).*

## PRI GRAMATIKAJ GENROJ

Mia pripenso povus ŝajni prokrasta, sed ne ĉiam tuj alvenas la solvo pri problemo, kiu aspektis komplika je la unuaj debatoj.

Bonvolu memori je la tiel nomata malsimetrio pri la <u>vira</u> afikso kaj la <u>ina</u> sufikso.

Fakte temas pri la vera, pri la geometria simetrio... kiel ĉe spegulo, kiu situas meze, inter maldekstra kaj dekstra flankoj.

La nura tikla afero estas la vorto "virino" mem. Sed kial ne uzi tutsimple "ino"-n ? Jen regulo, ĝenerale agnoskata : oni rajtas subkomprenigi nur tion, kio estas la plej grava. Ekzemple, kiam oni mezuras (ge)angulojn per la unuo "radiano" (kiu estas la ĉefa), oni rajtas subkompreni la simbolon de la unuo mem.

Konklude : "viro" estas "virhomo" kaj "ino" estas "homino". Se ni estus porkoj, la afero estus alia. Ĉar franca moto diras, ke la viroj (homoj?) estas porkoj ...(?) la disigo ne estas ebla, ĉar la franca uzas la saman vorton... Eble la rifuzo de la vorto "ino" en la signifo "virino" estas tutsimple pro sama influo de naciaj lingvoj.

**Lorenso**

## PRI NEŬTRAJ PERSONAJ PRONOMOJ

kial ne "ina" por homoj, "ina" por bestoj, "neŭtra" por homoj, ... por "aĵoj"... ktp? Estu ni seriozaj, kaj ne agu tiel, kiel malordema metiisto, kiu ĉiam aĉetas novajn ilojn... ĉar ĝi ne scias kien ĝi metis ilin.

Do, ni havas pronomon "ĝi", akcepteblan ĉu por homoj, ĉu por bestoj... neniam por la pluvo (vidu la vortaron tiurilate). Do oni uzu "ĝin", eĉ kiam oni parolas pri metio (ŝtatestro? plumbisto?), kiu povas esti ambaŭseksa...

**Lorenso**

## Kial malŝati abonojn

*Televido, radio kaj ĵurnalo ofte sklavigas homon. Pro kutimo oni rigardas, aŭskultas kaj legas ĉiutage. Ili fariĝis aŭtomataj agoj. Ni perdis per tiu aŭtomatismo nian* ***liberecon****. En multaj okazoj la rigardaĵoj, aŭskultaĵoj kaj legaĵoj ne tre interesas nin. Per ili ni foruzas vivotempon, periodojn en kiuj ni povos trovi vivoĝojon. Ankaŭ telefono ofte estas diktatoro, kiu sin enpenetras en nian vivon. Samsence ankaŭ bulteno altrudas, ke ni legu ĝin. Ni pagis abonon, sekve ni devas legi ĝin, almenaŭ laŭ kutimo. Kompreneble ekzistas pluraj abonantoj, kiuj flankenmetas ĝin, do eĉ ne rimarkas, kiam urĝas reaboni. Jen grava kaŭzo de la problemo sub la titolo "Ŝparigi monon al 'Laŭte!' " sur paĝo 3 de la Red. (L! n-ro 58)*

*Solvon pri tiu kaŭzo mi ne scias, sed tial mi restas NE-abonanto, pagante nur donacon.*

***iea iu***

## Kiel esti NE-eldonanto

Ĉar mi, kiun iuj afablaj sed vere erarantaj legantoj de L! foje nomas "redaktoro" en siaj leteroj, ja ĉiam konsideris min diletanta tajpanto-multobliganto-dissendanto de bulteno, pri kies gravo mi havas nenian iluzion... nu... kie estas la komenco de tiu ĉi pompa frazo ?... mi saltis pro ĝojo, legante la vidpunkton de tiu "iea iu" : "Kial malŝati abonojn".

Laŭ mi, li malkaŝe priskribas la ĝeneralan sintenon de multaj gazetricevantoj, kiuj eĉ ne plu memoras kiun kialon ili havis, kiam ili eksendis monon por ricevadi legaĵon. Efektive, kial aboni E-gazeton ?

* ĉu por subteni la "movadon" ?
* ĉu por plezurigi la "eldonanton" ?
* ĉu por plezurigi amikon, kiu konsilis tion fari ? (Sed kial la amiko mem abonis ???)
* ĉu por diskonigi al samlingvanoj siajn animstatojn ?
* aŭ pli banale, por almenaŭ lege praktiki esp-on, se oni ne emas mem skribe kontribui al la bulten-enhavo ?

Ĉiu leganto bonvolu mem esplori... Kiuj kutime eĉ ne elbanderoligas "L!"n, tiuj, kompreneble, eĉ ne havos tiun okazon cerbumi pri la problemo...

Mia vidpunkto estas tiom proksima de tiu de "iea iu", ke mi tuj konfesu, ke mi - neresanigebla individuisto - eldonas bultenon, nur por esti ĝia unua leganto ! Nur poste mia bonkoreco supervenkas, kaj mi dissendas la ricevitaĵojn, por ke aliaj individuistoj siavice ĝuu ilin... Kaj, kompreneble, ĉiujare mi, same kiel "iea iu", donacas iom da mono (por ne tro cerbumi mi rigardas sur la frontpaĝo, kiom kostas la abono), por ke oni ne juĝu min parazito... Mi do agas kvazaŭ NE-abonanto !!!

Unu el la multaj debat-temoj proponitaj por la ĉi-jara kongreso de la franclingvia laborista E-asocio estas "Fantazio en la ĉiutaga vivo". En nia iom tro rutinema movado, jen trafa propono ! Kial la legantaro de "L!" ne esprimu sin pri tiu temo ? Nu, ek, karaj, vi fantaziu iomete ! Certe pro tio ne plendos **Kribo.**

## ESTONTECO DE ESPERANTO ?

Sekve al kelkaj skribaĵoj (Vidu : "Kio estos la estonteco de Esperanto? en L! n-ro 55 - pĝ.31,32..), mi ricevis kelkajn respondojn de samideanoj. Por ili kaj aliaj esperantistoj mi respondas kaj klarigas iom pli mian penson.

Mi certas, ke ekzistas homoj, veraj geniuloj, kiuj povas havi ideon, inventon, ktp, kaj zorgi pri ĉiuj punktoj, tiel ke la ideo fariĝu uzebla tiel kiel (ĝi estis konceptita). Sed mi pensas ankaŭ, ke ofte la ideo ne aspektas bona por tuja uzo, sed tamen povas esti plibonigita ĉu de la iniciatinto, ĉu de alia, tiel ke fine ĝi fariĝas bona ilo...

Sed ankaŭ povas okazi, ke la ideo entenas multajn malbonaĵojn, erarojn, ktp, sed entenas tamen ion bon**an**, kiu estas uzebla. (La malbonŝanca fiŝkaptisto apartigas la bonaĵon antaŭ ol forĵeti la enhavon de la reto).

Permesu ankaŭ parentezon pri la naskiĝo de Esperanto. Certe Zamenhof estis geniulo. Li estis instruita, scipovis multajn lingvojn. Sed tio ne sufiĉis al sukceso de Esperanto. Ekzistis la ebleco, ke li ricevus respondon tian : "Via ideo ne estas realigebla. Via projekto havas nenian ŝancon sukcesi" ktp, en kelkaj frazoj aŭ kelkaj paĝoj. Kaj Esperanto ne estus aperinta...

Tion dirinte, mi respondas al kelkaj punktoj.

* "Via propono estas tute malbona en kelkaj landoj". - Mi ne komprenas tiun kontraŭdiraĵon. Esperanto estas kvazaŭ ne-ekzistanta en pluraj landoj. Ĉu ni devas prokrasti ĝian uzon en la aliaj, ĝis ĝi estos uzata en la tuta mondo?

Ankaŭ ne forgesu, ke Zamenhof, kiam li sendis sian proponon, petis ke oni promesu : *lerni la internacian lingvon, tuj kiam*

(?)000 *aliaj homoj estos farinta la saman promeson.* Se la korespondantoj estus farinta laŭvorte, eble ankaŭ E° ne aperus, ĉar povus pasi multaj jaroj antaŭ ol estus atingita la nombro, kaj poste... ?
* "Ne ĉiuj Esperantistoj volas esti enlistigitaj". - Certe. Sufiĉas, ke ni havu multajn.
* "Estas malbone enmeti la adreson... ankaŭ ĉar iuj ne estante skribemaj, ne respondos kaj malkuraĝigos la uzantojn" - Pro tio mi proponis ĉefe aldoni telefonnumeron. Estas strange, ke neniu rimarkigis, ke en kelkaj landoj, privata telefono povas esti pli malofta ol E-oj. Al tio mi respondis ĉi-supre. (Kelkaj komercantoj povas enmeti sian adreson. Ili respondos je trafa demando.)
* "Kiu povas fari tian laboron?" - Temas pri E-parolantoj, do ĉiuj devas unuiĝi pro tio, SAT, UEA, k.a... La laboro devas esti farata de la grupoj unuiĝintaj, ekzemple laŭ departemento en Francio. **L.A.**

(Lucien ANGEVIN, F 30740 Le Cailar)

Por ke ankaŭ la novaj abonantoj sciu pri kio temas la ĉi-supra kontribuo, jen de amiko L.A. la propono, kiu aperis en L!-n°55 : "... Mi proponas, ke oni faciligu al ĉiu E-parolanto la eltrovon de alia E-parolanto. Oni publikigu jarlibrojn entenantajn laŭ eblo kaj laŭ volo de la interesatoj la nomojn de ĉiuj personoj scipovantaj E-on. Tiu tasko estas farota de la E-asocioj. Ne temas pri iu monda jarlibro eĉ ne nacia, sed pri pluraj jarlibroj laŭ regiono kiel telefon-jarlibro. Laŭeble kaj nepre en okazo de interkonsento kun registaroj pri instruado en lernejoj, tiuj jarlibroj estos je publika dispono venditaj je plej ĝusta kosto kaj konsulteblaj en publikaj lokoj..." (ekstrakto) Noto de la Red.

*************************************************************

Aperis en Japanio :

**Akvon, mi petas!** (Atestoj de Hiroŝima kaj Nagasaki). Trad. kaj eldonis : Hukuoka E-Societo (la Grupo por Informi la Travivaĵojn de la Bombitoj). 64 paĝoj. Jen plia, sed certe ne superflua kolekto el raportoj kaj atestoj de atombombitoj. Prezo ne indikita.

**La Morta Suito, Oosugi Sakae, anarkiisto-esperantisto,** de Miyamoto masao. Eld. L'Omnibuso-Kyoto. 164 paĝoj. En Japanio, esperanto disvastiĝis komence de la jarcento ĉefe en kaj dank'al la progresemaj medioj socialistaj kaj anarkiistaj, senĉese persekutataj de la polico. Oosugi estis unu el la plej elstaraj pioniroj tie. Li mortis, strangolite de ĝendarma kapitano en 1923. Miyamoto abunde komentas ekstraktojn el la verkaro de Oosugi kaj citas el aliaj tekstoj. La tuto legiĝas facile kiel romano, sed ja vere "nigra" romano. Bela eldonaĵo. Prezo: 36,90 gld. L! volonte peras mendojn.



# INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO en Lage Vuursche, NL, 13./20. de julio '85

## PROGRAMO

SABATE : Alveno de la partoprenantoj en la junulara centro, kiu situas en arbarriĉa regiono meze de Nederlando. Per publika transporto atingebla per aŭtobuso, kiu forveturas de la stacidomo Utrecht aŭ Hilversum. Per aŭto facile atingebla. Vespere okazos interkonatiĝa kunsido, espereble en bela vetero sur la herbejo (kie oni ankaŭ povas kampadi). Poste popoldancado, promenado en la ĉirkaŭaĵo, kantado...

DIMANĈE : Ni faros ekskurson per bicikloj en la ĉirkaŭaĵo. Vizitos kastelon kaj montros la arbar-banejon kaj sportejon. Vespere ni invitos prelegantón pri aŭtomata tradukado.

LUNDE : Rolludoj pri Junularo kaj Diskriminacio. Sekve rakontoj de propraj spertoj far diverslandaj elmigrintaj esperantistoj pri diskriminacio. Kaj komprenehle ankaŭ pri ĉiaj aliaj specoj de diskriminacio. Vespere krespobakado, antaŭe sportado. Preparado de teatraĵoj.

MARDE : Tuttaga vizito al Amsterdamo. Biciklado per rem biciklo tra la kanaloj, rondirado tra Amsterdamo, vizitado al muzeo ; vespere ripozado.

MERKREDE : Rolludoj pri Junularo kaj Laboro. Lige al tiuj : Forumo kun partopreno de reprezentantoj de junularaj asocioj nederlandaj (sindikata, virina, naturamika, liberal-konservativa). Vespere popoldancado, noktpromenado.

ĴAŬDE : Ekskurso al Utrecht. Rondirado tra la malnova centro de la urbo. Vizitado al fervoja muzeo.

VENDREDE : Vizitado al Oud Loosdrecht, laga regiono. Unue vizito al fromaĝbieno, poste remado sur la lago kaj vizitado de naturregiono. Vespere, teatraĵoj.

SABATE : Adiaŭo kaj foriro. Tiuj, kiuj volas resti ĝis la SAT-Kongreso, povas aranĝi pluan restadon surloke aŭ peti inviton ĉe nederlandaj gekamaradoj.

Dum la tuta semajno okazos esperanto-kurso por progresantoj matene. Eble ni havos ankaŭ la plezuron aŭskulti esperanto-pop-muzikon...

## UTILAJ INFORMOJ PLIAJ

Bonvolu kunporti dormosakon. Tiuj, kiuj volas tendumi, bonvolu indiki tion sur la aliĝilo. Same bonvolu indiki, ĉu vi estas jes aŭ ne vegetarano, kaj ĉu vi jes aŭ ne intencas veni per aŭtomobilo. Se vi estas membro de naturamika movado, bonvolu kunporti vian membroateston. Membroj de junulargasteja asocio bonvolu same kunporti sian ateston pri membreco ; povas esti, ke ankaŭ ili ĝuos rabaton (ankoraŭ ne decidite).

Ĉar ni volas esti certaj pri tio ke homoj ne estos resendataj pro manko de loko en la junulara centro, ni petas vin aliĝi antaŭ la 1-a de junio, tiel ke vi estos certa pri loko. Antaŭpago de 10 guldenoj sur ĝirkonto 2703131 (Arnhem) nome de B. de Wit, Postbus 425; NL 2100 AK Heemstede, necesas.

## KOSTOJ

La kotizo estas : 200 guldenoj por pli-ol-25-jaruloj, kiuj ne estas membroj de naturamika asocio. Tiu baza kotizo inkluzivas 7 tranoktadojn, manĝojn kaj la pagon por muzeaj abonoj (se vi havas vialande rabatilon, kunportu!) kaj la rondirado en Amsterdamo (inkl. akvobicikladon) kaj Utrecht. Ceteraj ekskursoj estas libervolaj kaj ne tiom altprezaj. Pri transporto ni trovos solvon surloke. Eble estos sufiĉe da aŭtomobiloj, alie parto iros aŭtobuse kaj trajne (kostoj ne inkluz.)

La kostoj varias plie laŭ aĝo :

ĝis 14-j. oni pagas 22 guld. malpli, aŭ 45 malpli (naturamikoj)

de 15-j. ĝis 25-j.: 10 39

pli ol 25-j. pagas 27 gld malpli, se naturamikoj.

Tendumantoj :

de 15/25-j. : pagas 39 gld. malpli aŭ 68 gld. malpli se naturamiko

pli ol 25-j. : 47 59

(Kiom konfuze, sed en via propra intereso!)

Pliaj informoj akireblaj ĉe B. de Wit aŭ Saskia Veen :

| | |
|---|---|
| IJR | IJR |
| Postbus 425 | Prof. Nijpelsstraat 19d |
| NL-2100 AK Heemstede | NL-6224 BS Maastricht |

## ALIĜILO

(bonvolu detranĉi aŭ kopii)

**Aliĝkotizo : 10 guldenoj al konto 2703131 de B. de Wit, Postbus 425, NL-2100 AK Heemstede**

Familia nomo : Antaŭnomo :

Naskiĝdato : Adreso :

aliĝas al la IJR en Lage Vuursche.

Mi venas per... aŭto jes/ne trajno/aŭtobuse jes/ne

Mi deziras manĝi vegetare : jes/ne

Mi volas tendumi : jes /ne

Mi volas disponi pri biciklo surloke ; bonvolu lui tiun se eblas : jes/ne.

Mi volas partopreni al la ekskurso al la lagoj : jes/ne

subskribo :

Interesiĝantoj el nepagipovaj landoj bonvolu sin turni al la organiza komitato. Ne forgesu kunporti dormosakon, membroatestojn de naturamika movado, ks, kaj eventuale varmigajn vestojn/pluvombrelon, kvankam ni ne mendis malbonan veteron! Sendu la aliĝilon al IJR, Postbus 425, NL-2100 AK Heemstede, Nederl.

Gérant-imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut, CPPAP 58651